

PLENA VORTARO
de ESPERANTO

TRIA ELDONO

PLENA VORTARO

DE

ESPERANTO

VERKITA DE

**Profesoro E. GROSJEAN-MAUPIN, Direktoro de la Sekcio
„Komuna Vortaro” de la Esperantista Akademio, A. ESSELIN
S. GRENKAMP-KORNFELD, Profesoro G. WARINGHIEN,
Membroj de la Lingva Komitato**

TRIA ELDONO

PLENA VORTARO ILUSTRITA

Kiam, antaŭ 16 jaroj, S.A.T. iniciatis la eldonon de *Plena Vortaro*, tiam relative multaj esperantistoj opiniis tian entreprenon nesaĝa, almenaŭ antaŭtempa k verŝajne fiaskonta. Tamen la sperto montris, ke tiu verko respondis al reala bezono, ĉar ĉi tiu eldono fakte estas la kvara. Klarigcele ni diru, ke jam delonge ĉinaj esp-istoj faris **senper-mese** eldonon laŭ fotoprocedo

Ni decidis uzi tiun saman procedon por ĉi tiu eldono, tial ke la iniciatinto de la verko, E. L a n t i, planas havigi al la esp-istaro enciklopedieton, kun ilustroj k parto pri propraj nomoj. Tiucele li jam varbis plurajn kompetentajn, aŭtoritatajn kunlaborantojn.

La verko titoligos **PLENA VORTARO ILUSTRITA** k estos 1.000- eble eĉ 1.200-paĝa. Memkompreneble, ties kerno estos la nuna P.V., kies vortoj estos revizitaj sub la finkontrolo de profesoro G. V a r i n g j e n, la sola postvivanto el la kvar aŭtoroj. Jam li ricevis el ĉiuj landoj aniason da notoj k atentigoj de esperantistoj, kiuj uzis la verkon dum pluraj jaroj k tiel akiris la firman konvinkon, ke en Esperantio oni nepre bezonas, kiom eble plej ampleksan k fidindan Vortaron.

Ĉar ni diris, ke la nun prilaborata Enciklopedieto estos ilustrita, ni jam povas konigi, ke ĉefe prizorgos la ilustradon la aŭtoritata arkitekto F. A z o r i n, aŭtoro de **UNIVERSALA TERMINOLOGIO DE LA ARKITEKTURO** (Arkeologio, Arto, Konstruo, Metio).

Ni diris sufiĉe, por ke la legantoj povu facile kompreni, ke la aŭtoroj de P.V.I. bezonas relative longan tempon por finpretigi ties materialon. Tial ni decidis fari eldonon de P.V. laŭ fotoprocedo, por ke ili povu zorge plenumi sian taskon.

S. A. T.-Direkcio

ANTAŮPAROLO

Jam de longe la dezirindeco de **PLENA VORTARO** estas de ĉiuj rekonata k Zamenhof mem jam en la jaro 1911 deklaris, ke « ni ekstreme bezonas **PLENAN VORTAREGON** ». Tamen pro la malfacileco k longdaŭro de la tiucela laboro, pro la multaj malhelpoj, kiujn kaŭzas la multnombreco k diverslanda dissemiteco de la Lingvakomitatoj, k precipe pro la manko de la necesaj monaj rimedoj, la afero ŝajnis ĝis tre malproksima tempo nerealegebla.

La kuraĝa iniciatemo de la Direkcio de SAT k la laŭdinda malavareco de diversaj SAT-anoj ebligis la efektivigon de tiu ĉi verko, kiun ĉiuj, k precipe la Lingvakomitatanoj, povos facile ekzameni, esplori k pridiskuti tiamaniere, ke, kiam la Esperantista Akademio estonte prenos sur sin, laŭ la deziro de Zamenhof, la eldonon de Oficiala Plena Vortaro, la nuna verko oportune liveros la necesan preparan bazon, sur kiu la oficiala eldono povos stariĝi.

Efektive la Vortaro, kiun ni prezentas nun al la esperantista publiko, konsistas el du apartaj partoj :

1-e Unu vortaro de la komuna lingvo, verkita nur de la Trio, konsistanta el Prof. GROSJEAN-MAUPIN, Direktoro de la Akademio Sekcio por la Komuna Lingvo, Prof. WARINGHIEN, Lingvakomitato k S-ro ESSELIN, Lingvakomitato, — sub la kontrolo k direktado de Prof. GROSJEAN-MAUPIN ;

2-o Unu teknika vortaro, verkita nur de S-ro GRENKAMP-KORNFELD.

Kiel la Trio estas responda nur pri la parto, kiun ĝi verkis, same S-ro GRENKAMP-KORNFELD estas responda nur pri la parto, kiun li, sen kontrolo de la Trio, prilaboris.

Estas pritraktitaj de la Trio, la sekvantaj partoj :

1-e Ĉiuj oficialaj vortoj ;

2-e Ĉiuj neoficialaj vortoj ne signitaj per vinjeto aŭ klariga mallongigo;

3-e Ĉiuj neoficialaj vortoj signitaj per la vinjetoj : ♣, ♠, ♡, ☉, aŭ per la mallongigoj : (Bb), (G), (Fon), (V), (Ar), (K), (R), (Rk).

Al S-ro GRENKAMP-KORNFELD, Lingvakomitatano, apartenas ĉiuj aliaj vortoj. Plie, en kelkaj okazoj, S-ro GRENKAMP-KORNFELD aldonis al oficiala vorto iun specialan, pure teknikan senceon, kiu koncernas la fakojn : , , , , , , , (Mh), (Sc).

ANTAŬPAROLO

Por precizigi la aŭtorecon k respondecon de ĉiu, ni indikas ke Prof. WARINGHIEN pli speciale verkis la gramatikan parton de la vortaro (afiksoj, prepozicioj, konjunkcioj) k la sinonimojn, k ke Prof. GROSJEAN-MAUPIN zorge reviziis la tutan verkaĵon de la Trio, ofte ŝangante, kompletigante aŭ eĉ tute reverkante, precipe en tiu ĉi dua eldono.

Nun ni volas plenumi agrablan devon, kaj ne citante detale la riĉan ekzistantan vortaran literaturon, kiun ni profitis, ni varme rememoras al Prof. CART, Prezidinto de la Esperantista Akademio, k kore dankas al S-roj Prof. AYMONIER, Ing. BOBIN, KREUZ, LA COLLA, MAZZOLINI, Prof. MIGLIORINI, k al ali: j britaj k slavaj samideanoj, kiuj sendis al ni multajn interesajn rimarkojn k sugestojn. Okaze de ĉi tiu dua eldono ni esprimas krome nian sinceran dankon al multaj diversnacaj, ankaŭ japanaj, samideanoj, kiuj sendis al ni interesajn rimarkojn. Ni citu nur S-ron M.-C. Butler k S-ron S.-H. SCOTT, kiu bonvolis disponigi al ni la notojn kolektitajn dum plej detala k plej, diversa legado. Speciale por la teknika parto, S-ro GRENKAMP-KORNFELD dankas antaŭ ĉio al S-ino FALLOT, ĉefredaktorino ĉe la Internacia Instituto de Intelektua Kooperado, pro ŝiaj bonvolaj multaj traserĉoj efektivigitaj en diverslingvaj sciencaj revuoj, al Prof. MESNY, eminenta sciencisto, kiu bonvolis tralegi multajn el liaj slipoj rilataj al elektro-scienco, al sia amiko LAURAT (Revo), la eminenta ekonomisto, kiu bonvolis tralegi preskaŭ ĉiujn liajn difinojn pri la ekonomia kaj materialista historioj, k per tio trankviligi lian konsciencon, ke nenie li provis ilin misklarigi; al S-roj BUTLER, D-ro DÖHLER, Generala Ing. ROLLET DE L'ISLE k WÜSTER, kiuj bonvolis afable respondi liajn demandojn. Li ne povas ankaŭ forgesi la *Polan Bibliotekon*, kiu ne nur disponigis al li apartan ĉambron por lia laboro, sed venigis multajn verkojn el aliaj eksterlandaj bibliotekoj k eĉ kelkajn speciale aĉetis.

Fine ni citu la nomon de S-ro LANTI, kiu seninterrompe bonvolis al ni helpadi kaj konsiladi, kaj nur dank' al kies aktiveco, ĉiam sagaca sinteno kaj takto efektivigis la entreprenon.

Kun sincera danko la aŭtoroj akceptos k atentos ĉiujn seriozajn kritikojn k sugestojn, tiel, ke la verko povu plibonigi per ĉies helpo.

PARIZO, en decembro 1933.

Prof. GROSJEAN-MAUPIN.
ESSELIN.
GRENKAMP-KORNFELD.
Prof. WARINGHIEN.

KOMUNLINGVA PARTO

Tiu ĉi Vortaro estas destinita por servi ne nur al tiuj, kiuj deziras ĝuste kompreni ĉiujn esprimojn k nuancojn de la esperanta teksto, sed ankaŭ al tiuj, kiuj volas korekte k bonstile verki ion en esperanto. Por helpi al tia verkado, ni multigis la klarigajn rimarkojn pri la sinonimoj k la komparojn k resendojn al la signifoparencaj esprimoj.

La uzanto facile rimarkos, ke ĉi tiu Vortaro distingiĝas ankaŭ per la multeco de la cititaj ekzemploj. Ni efektive opinias, ke tia abundo estas la plej taŭga rimedo ne nur por montri la ĝenerale regantan uzadon, sed ankaŭ por komprenigi la senco de la vortoj aŭ esprimoj k por precizigi iliajn nuancojn. En tiu ĉi dua eldono Prof. GROSJEAN-MAUPIN ankoraŭ pliriĉigis la sinonimaron k plimultigis la nombron de la ekzemploj, precipe de la Zamenhofaj. Ankaŭ li plimultigis la Rimarkojn.

Ĉar ni antaŭ ĉio celis la plej eble grandan praktikan utilecon, ni intence preterlasis tiujn el la kunmetitaj derivitaj vortoj, kies senco k kompreno prezentas nenian malfacilaĵon, k ni kontraŭe insistis pri la malfacilaj k hezigitaj punktoj, penante por plene klarigi ilin. Kun aparta zorgo ni pritraktis la metaforajn sencojn kiuj estas unu el la precipaj fontoj por viviĝi la lingvon, kondiĉe, ke ili estu ĝenerale k internacie facile kompreneblaj.

La legantoj bonvolu rimarki, ke ne troviĝas en nia verko propraj nomoj. Sekve ili vane serĉus, ekzemple, klarigojn pri *Koreo*, *Koreujo*, *Koreio*, *Svislando*, *Svisujo*, *Svisio* ks. formoj, troveblaj en la esp. literaturo. Ne estas nia tasko ekzameni la problemon pri unuecigo de landnomaj formoj; la estonto solvos, se solvebla, tiun problemon.

Similan rimarkon ni volas fari pri alia punkto, nome uzo aŭ neuzo de sufixoj en kazoj, ĉe kiuj bonaj aŭtoroj uzas k aliaj same bonaj forlasas. Cetere, studante la verkaron de Zamenhof, oni konstatas, ke plej ofte la hazardo, la kaprico decidis pri almeto aŭ forlaso de sufixoj. Oni ja trovas en *Originala Verkaro*, ekzemple, la formojn *eblo*, *ebleco*, *frenezo*, *frenezeco*, *neceso*, *neceseco*, *oportuno*, *oportuneco*, *pentro*, *pentraĵo*, *nulro*, *nultraĵo*, *konstruo*, *konstruaĵo*, ks. en kazoj, ĉe kiuj estas neeble klarigi, kiel Zamenhof jen almetis sufixon, jen forlasis ĝin.

Kelkaj aŭtoroj sisteme forlasas la sufixon *ec* ĉe radikoj kun adjektiva signifo. Kiam ili almetas ĝin ĉe tia kazo, estas nur pro eŭfonia konsidero. Ni simple notas tiujn faktojn por averti la legantojn, ke ili ne vane serĉu en la P. V. respondon al demandoj, kiuj rilatas la stilon k estas ekster nia kompetento kiel vortaristoj.

Ni estas konvinkitaj, ke unu el la plej gravaj servoj, kiujn povas fari la P. V. estas efike kontribui al la necesa kribrado, senbalastigo, purigo kaj fiksigo de nia en la lasta tempo tro rapide dikiĝinta k senutile ŝveliĝinta vortaro. Kvankam la P. V. devas esti antaŭ ĉio konstatilo k registrilo, kiu atentigas la uzantojn de esperanto pri la evoluo de la lingvo, pri la ekzisto k interbatalo de la samsignifaj vortoj aŭ formoj, pri la neceseco forigi tian duoblecon, k.t.p., ĝi tamen ankaŭ estas diskreta konsilanto. Ni speciale altiras la atenton sur la signon (Ev.), per kiu ni signas la vortojn k esprimojn, kiujn ni senŝancelige k firme malrekomendas; sed kompreneble ni ne povis meti tiun avertilon apud ĉiuj radikoj, kiuj ne plaĉas al nia persona gusto k kiujn ni ne konsilas. Tia elekto estas la tasko de la Lingvaj Institucioj. Nia plej forvora deziro k espero estas, ke tiu ĉi verko, frukto de multaj jaroj da diligenta k senlaca laboro, senprokraste utilu por antaŭprepari la iompostioman plisimpligon k unuecigon de nia kara lingvo, k ke ĝi pli poste estu iam, konforme al la penso de Zamenhof, solida bazo por estonta Oficiala Plena Vortaro. Tiu-ĉe ni ne forgesu la konsilon de nia Majstro k ni ne tro rapidu; ni memoru ankaŭ la vorton de mondfama lingvisto, kiu favoras al esperanto, Prof. MEILLET: « Ju pli senŝanĝa, des pli utila estas lingvo ».

Parizo, Decembro 1933.

E. GROSJEAN-MAUPIN.
G. WARINGHIEN.
A. ESSELIN.

TEKNIKA PARTO

Mia tasko por la dua eldono estis simpla : resti en la kadroj de la unua eldono t.e. ne pliŝveligi mian parton, sed ĝin iom pliharmonigi. Konsekvence mi forigis kelkajn ŝajne tro sciencajn vortojn k enmetis kelkajn pli utilajn.

Kun vera plezuro mi konstatas, ke oni kritikis nur du vortojn. La unua *ŝoforo* prenas nun la pli uzatan formon : *ŝoforo*. La alia vorto, kiu ricevis kelkajn kritikojn, sed ankaŭ aprobojn, estas *gazbando*. La kritikoj malaprobaj venis plej parte de tiuj, kiuj malatentis ĝian prononcon.

Se je ĉirkaŭ kvindeko da leteroj, tio estis la solaj rimarkoj pri la vortformoj de mi uzitaj en la TEKNIKA PARTO, tion mi dankas al tio, ke mi nenie sekvis mian personan guston, sed nur certajn regulojn, kiuj jam ekzistas en nia vivanta lingvo por la enkonduko de teknikaj vortoj¹. Mi ne sekvis blinde la unuajn vortarojn, kiuj havis merititan famon, ĉar ili estis la unuaj provoj, sed kiuj enhavas grandan kvanton da eraraj formoj k vortoj. La devo de la nunaj vortaristoj estas ne ruinigi la normalan evoluon de nia lingvo k ne simie k senkritike sekvi la malnovajn vortarojn eĉ kun iliaj evidentaj preseraroj.

La plej oftĉ uzatajn teknikajn afiksajn mi metis ne en la vortaron, sed publikigas en aparta tabelo. Mi atentigas ankaŭ, ke nur la plej popularaj botanikaj, zoologiaj ke familiaj, ordaj ktp nomoj estas difinitaj en la vortaro, sed ne ĉiuj, kiujn mi uzis en la difinoj.

Mi esperas, ke la esperantistaro akceptos tiun duan eldonon kun la sama ĝojo, kun kia ĝi akceptis la unuan.

Estu tiu dua eldono, brila pruvo, ke esperanto fariĝinte vivanta lingvo k meritante la saman respekton, kiel ĉiu alia lingvo, havas jam belan neŝanĝeman lingvan bazon, — kion pruvas ankaŭ la neŝanĝemo de la vortformoj k de difinoj de ĝia TEKNIKA PARTO.

Parizo, en decembro 1933.

S. GRENKAMP-KORNFELD.

¹ Ne ĉi tie estas loko por paroli pri tiuj reguloj.

Sciencaj kaj Teknikaj Afiksoj

(la plej ofte uzataj)

Prefiksoj.

- di-** √. Prefikso uzata por formi la nomon de substanco, en kiu la pezo de la oksigeno k de la elektronegativa elemento estas laŭ la rilato 2 : 1 : —*oksido*, —*karbonato*, —*kromato*.

Sufiksoj.

- ao-** ☞. Sufikso uzata por formi la nomon de familio, per ĝia aldono al la radikoj aŭ de la tipa genra nomo : *rozo*, *roz—oj*, aŭ de la tipa karakterizilo : *legumeno*, *legumen—oj* ; *umbelo*, *umbel—oj*.
- al-** ☞. Sufikso uzata por formi la nomon de ordo, per ĝia aldono al la radikoj de la tipa genro de la ĉefa familio : *poligono*, *poligon—oj*.
- at-** √. Sufikso uzata por formi la nomon de acida salo : *klorato* (MClO₃) ; *sulf—oj estas pli acidaj ol sulfitoj*.
- hidr-** √. Sufikso uzata por formi la nomon de kombino de metaloido kun hidrogeno : *brom—a*, *jod—a*.
- id-** √. Sufikso uzata por montri duelementan kombinon sen oksigeno : *kalia brom—o* (KBr).
- il-** √. Sufikso formanta radikalojn : *azot—o*, *karbon—o*.
- it-** 1 √. Sufikso uzata por formi la nomon de malpli acida salo ol -ata.
2 ☞. Sufikso por formi la nomon de organa inflamo : *apendico*, *apendic—o* ; *bronko*, *bronk—o*.
- iv-** ☞. Sufikso uzata por formi vortojn kun aktiva kapablo, povo, scio, kontraŭe al la pasiva -*abl* ; ĝi do havas la signifon : kapabla, pova : *produkt—a* (= produktokapabla, produktopova).
- iz-** ☞. Sufikso uzata por formi vortojn kun la signifo : provizi per, kovri per : *stan—i* (= surkovri per stano).
- old-** 1 ☞. Sufikso uzata por formi la nomon de subfamilio, per ĝia aldono al la radikoj de la tipa genra nomo : *asfodelo*, *asfodel—oj*.
2 ☞. Sufikso uzata por formi la nomon de familio, per ĝia aldono al la radikoj de la tipa genra nomo : *sciuro*, *sciur—oj*.
- oz-** ☞. Sufikso uzata por formi vortojn kun la signifo : provizita de, plena de, riĉa je ks : *sabl—a* (= sabloriĉa).

Signifo de la Signoj kaj Mallongigoj

Bildoj kaj signoj de fakoj

♥	Anatomio, fiziologio.	🦎	Zoologio.
🏠	Arkitekturo.	(Ar)	Arkeologio.
🔭	Astronomio.	(Bb)	Biblio.
♣	Vidaj belartoj.	(Bl)	Bionologiaj sciencoj.
🌿	Botaniko.	(Fv)	Fervojo.
💰	Hemio.	(Fon)	Fonetiko.
£	Komerco, financo.	(Ge)	Geografio.
🐞	Entomologio.	(G)	Gramatiko, lingvistiko.
📖	Beletro, literaturo.	(H)	Historio.
□	Fiziko.	(K)	Katolikismo.
📚	Filozofio.	(Ku)	Kuirarto.
📷	Fotografio.	(M)	Materialista doktrino.
⚓	Maraferoj.	(Me)	Meteorologio.
△	Matematiko, geometrio, mezuro.	(Mh)	Marksismo, historia materialismo.
🏥	Medicino, farmacio.	(Opt)	Optiko.
👊	Militarto.	(R)	Religioj.
★	Mineralogio.	(Rk)	Kristanaj religioj.
☉	Mitologio.	(Sc)	Sciencoj.
🎵	Muziko, danco.	(Sp)	Sporto, ludo.
📻	Radio, elektro.	(Tea)	Teatro.
👤	Sociologio, politiko, juro.	(Ti)	Tipografio.
⚙	Tekniko, mekaniko.	(V)	Versfarado.

Referencoj de la ekzemploj, nomoj de aŭtoroj

Z	Zamenhof	C	Christaller	F	Fulcher k Long	K	Krestomatio
B	Bein	D	Millidge	G	Grabowski	N	Bennemann
R	Rollet de l'Isle	V	Vérax	Y	Diversaj aliaj vortaristoj.		

Mallongigoj

abs.	absolute, senkomplemente	kc	kaj ceteraj.
adj.	adjektivo.	ks	kaj similaĵ.
adv.	adverbo.	ktp	kaj tiel plu.
ukuz.	akuzativo.	konj.	konjunkcio.
anst.	anstataŭ.	Kp	Komparu.
esp.	esperanto.	Lf	Lingvo Internacia.
Ev.	evitinda.	LK	Lingva Komitato.
f	figure, metafore.	ntr	netransitiva.
fam.	familio.	p. p.	parolante pri.
G	genro.	part.	participo.
inf.	infinitivo.	pref.	prefikso.
interj.	interjekcio.	prep.	prepozicio.
(iu) (io)	metita antaŭ la signif- klarigo de verbo mon- tras ke la subjekto estas ĉiujfoje persono aŭ aĵo.	pron.	pronomo.
(iu) (io)	metita antaŭ la signif- klarigo de adjektivo si- gnifas: kvalifikante per- sonon aŭ kvalifikante aĵon.	prop.	propozicio.
		Rim.	Rimarko.
		sk	subkompreneu.
		subst.	substantivo.
		tr.	transitiva.
		veg.	vegetaĵo.
		Vd	Vidu.
k	kaj.	x	tr. k ntr.
		Z	Zamenhof.

Signoj

=	enkondukas sencoklarigon aŭ samsignifan es- primon.		de dubo, ke la komparoj enkondukataj per Kp aŭ Vd koncernas nur la laste pritraktitan vorton aŭ signifon, sed ne la antaŭajn vortojn aŭ si- gnifojn.
~	servas por anstataŭi la radikon diklitere presi- tan ĉe la komenco de la artikolo.		
	servas por anstataŭi la forestantajn literojn en mallongigita radiko.	Ciferoj	Kiam iu cifero senpere sekvas iun vorton, tio signifas, ke temas nur pri tiu el la diversaj sencoj de tiu vorto, kiu estas montrita en la koncerna artikolo per sama cifero.
()	la parentezoj servas por enteni klarigojn aŭ an- kaŭ por montri, en okazo		

SIGNIFO DE LA SIGNOJ KAJ MALLONGIGOJ

! Dupunkto post la mallongigaĵo (f) montras, ke la koncernata vorto estas uzata metafore en tiuj sekvantaj ekzemploj.

* Antaŭmetita steleto montras la radikojn apartenantajn al la Fundamento.

Granda litero komence de la diklitere presita radikoj, kiu estas la temo de la artikolo, montras, ke tiu radikoj estas oficiala.

La sinonimaro estas presita per grandaj literoj, kompreneble la sinonimoj jam trovigantaj en la difinoj ne estas denove cititaj.

Tiuj Zamenhofaj radikoj, kiuj ne estas oficialaj, estas signitaj per Z. Tiuj, kiuj estas oficialigitaj, estas nur escepte tiel signitaj.

La nomon de ĉiuj sub-
stancoj sekvas ilia ĉiuj
formulo.

